



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de la normandaj esperantistoj

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :

n°172

*Minimuma kotizo por 1991 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN
Sendu vian postĉekon rekte al via CCP Centro
bankĉekon al Pierre Guillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly*

JULIO 1991A

SOMERO 1991A

N° 87A NOVA SERIQ.

Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81

UTILISER L'ESPERANTO

L'année scolaire est terminée, ainsi que les cours d'Espéranto. Nous avons convaincu quelques personnes de l'utilité d'une langue internationale neutre, logique, rationnelle. Ces personnes ont fait l'effort de l'étudier, certaines par curiosité ou pour passer le temps, mais la plupart avec l'intention de s'en servir.

C'est là que se pose ce qu'une de nos amies du Havre appelait le service "après-vente de l'Espéranto". Comment se servir de cette langue ? Ce qu'il ne faut pas faire : attendre que le hasard place sur notre chemin un individu avec l'étoile verte à la boutonnière !...

Il faut tout d'abord correspondre. Les correspondances se compléteront un jour ou l'autre par des invitations réciproques (voir dans ce même numéro la lettre de Barbara).

Il faut perfectionner sa connaissance de la langue en apprenant d'autres racines, d'où nécessité de la lecture de périodiques et de livres. Il faut s'abonner aux différentes revues (Heroldo, Monato, ...) et utiliser les services de librairie des associations espérantistes. L'adhésion à l'une des associations nationales est indispensable pour en utiliser les services, et pour soutenir l'action en faveur de la langue internationale. Il faut aussi participer aux congrès nationaux. A Pâques, quelques Normands ont pris part au congrès de SAT-Amikaro à Amboise ; ce congrès a réuni plus de 300 participants. Le congrès d'UFE a eu lieu à Boulogne sur mer, lieu historique pour les espérantistes puisque c'est là qu'eut lieu le premier congrès mondial, en 1905.

Mais l'Espéranto doit être utilisé surtout à l'échelle internationale,

.../...

.../...

c'est pourquoi, il faut adhérer aux organisations mondiales comme UEA ou SAT. L'adhésion permet de recevoir la revue officielle de l'organisation et l'annuaire des délégués (jarlibro). Cet annuaire vous permettra d'organiser vos vacances à l'étranger ; vous y trouverez les adresses des "samideanoj" prêts à vous aider. D'autres organisations plus spécialisées (cheminots, catholiques, pacifistes, baha'his, etc...) vous permettront de contacter des amis ayant des préoccupations communes. Vous pourrez aussi retrouver ces amis lors des grands congrès mondiaux. Souvent, des voyages collectifs sont organisés pour participer à ces congrès qui, outre les débats, vous offriront du théâtre, des danses, des conférences, des concerts, et du tourisme.

Il y a aussi des réunions moins formelles : des séminaires, des stages dans les maisons culturelles de Grésillon, de la Chaux de Fonds, de Bouresse, ainsi qu'en Bulgarie et en Pologne.

Si vous ne pouvez pas maintenant faire de longs voyages, fréquentez régulièrement les réunions du groupe local le plus proche de votre domicile. Faites vous inscrire dès maintenant pour participer à l'Assemblée Générale de l'Union des Espérantistes de Normandie qui aura lieu au Havre les 12 et 13 Octobre.

Les occasions de pratiquer la langue internationale sont multiples et apportent un grand plaisir personnel. Elles démontrent aussi à ses détracteurs que l'Espéranto est une langue vivante et utile. Encore faut-il le faire savoir !

PETRO KIJO

ASSOCIATIONS INTERNATIONALES

- Universala Esperanto Asocio (UEA) : Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
- Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) : 67, avenue Gambetta F-75 020 Paris

ASSOCIATIONS NATIONALES

- Union Française pour l'Espéranto (UFE) : 4bis, rue de la Cerisaie
75 004 PARIS Tel. 42786886
- SAT-Amikaro : même adresse que SAT

LA VENONTA

BULTENO

APEROS

SEPTEMBRE

VIAN

KONTROVON

NI

ATENDAS

ĈU ?

vire

Profesoro Waringhien skribis, ke nia afero Esperanto ankoraŭ ne "maturiĝis" je la publiko. Li estas tute prava.

Ĉefe, en Vire la afero ne maturiĝis, ŝajnas ke la Vire'anoj estas aparte "alergiaj" pri la internacia lingvo. Ŝajne, ili konsideras esperanton kiel io strangeta, seninteresa, kiun normale edukita homo ne studas, ne praktikas.

Malgraŭ oftaj gazetartikoloj miaj, multaj supozas ke esperanto estas fiaskinta, malaperinta provo.

Ankaŭ la opinio de kelkaj pastroj (regionaj) estas iom stranga. Unu, kiu iomete ĉeestis kurson, diris al mi : "Via esperanto estas tiel malfacila kiel latino !". Alia pastro (de iu vilaĝo) diris al amiko mia, esperantisto "Ne sendu propagandilon al mi, ĉar mi tuj ĝin ĵetas en la rubskatolon !".

En Vire, iu homo forstrekiis la esperantlingvan tekston kiun (iam) mi sukcesis aperigi sur la faldfolion (broŝuro) pri la urbo (apud la nacilingvaj tekstoj).

Iam, en la urba biblioteko, propagandiloj unue metitaj sur la tabloj poste eniĝis en la tirkestojn pro la malfavora sinteno de iuj vizitantoj.

Tio-ĉi klare montras, ke daŭre ekzistas antaŭjuĝoj pri nia lingvo. Por ilin forigi, ni devas senlace batali per raciaj argumentoj.

A. LEGRET

hérouville

Jen kursjaro finiĝinta kaj la momento por juĝi ĝin. 22

personoj pagis sian kotizon, tiom multaj neniam ni estis ! De du jaroj, tiam starigis regula kurso en Socikultura Centro, nia klubo pli firme strukturiĝis, en amika etoso. 12-15 regule partoprenas la ĉiusemajnan kurson, inter ili pluraj regule legas romanojn en esperanto, aŭ aliĝas al naciaj aŭ internaciaj asocioj.

Partopreno al la festo de la asocioj, akcepto de 3 eksterlandanoj (pere de UFE) kiuj prelegis dum publikaj kunvenoj, prelegoj de kursanoj, komunaj manĝoj, alportis multe al la vigleco de la grupo.

Nia publika vivo kaj rilatoj kun la urbodomo kreskis multe. Ni ricevis 1500 frankan subvencion. La kongreso de SAT-Amikaro okazos en Hérouville en 1993, tio tre certe estos favora al esperanto en Hérouville kaj en Caen.

Ni multe esperis partopreni la delegacion de nia urbo al Tihvin, ĝemela urbo apud Leningrado. Tie estas esperantista grupo kun kiu ni regule korespondas. Tre certe nia asocio estas la unua en Hérouville kiu korespondis kun loĝantoj de Tihvin. Malgraŭ klariga letero al la urbestro, ni ne sukcesis trovi lokon en tiu delegacio kiu entenis la urbokonsilantojn, sportistojn, kaj muzikistojn. Tamen, multaj pluraj anoj de tiu delegacio konstatis ke esperantistoj estas multaj en Tihvin, eĉ diris "finfine esperanto povus estis solvo, ĉar malfacilaĵoj ne mankis por dialogi !".

grand-quevilly

15 personoj partoprenis semajnan renkontiĝon. Ili studis la libron "Amuzaj Dialogoj". Gramatikajn klarigojn donis la kursgvidanto. La etoso estis ĉiam agrabla, simpatia kaj ...studema. Fine de Septembro, ni rekomencos tiujn kunvenojn.

La 26/27an de Oktobro, okazos en Teatro Ch. Dullin "Forum des Associations". Tie, ni starigos budon. Post tiu 2 taga propagando, ni eble malfermos kurson por komencantoj. En Grand-Quevilly, la esperantista grupo estas fako de kultura asocio : Laika Amikaro.

Dume kaj apude, Riĉa grupo (GERR), ĉiam sen prezidanto, dormegas. Aŭtune, la eksmembroj de GERR estos kunvokataj en eksterordinara asembleo por ordigi la aferon.

PETRO KIJO

yvetot

La duagrada kurso, interrompita dum pluraj monatoj, rekomenciĝis fine de Januaro. Ĝi okazis ĉe S-ino Sallio aŭ ĉe Ges-oj Chevallier, kaj fine ĉe S-ro Pottier, ĉiunmerkrede je la 17a horo, ĝis la fino de Junio.

La 7an de Aprilo okazis en Salle du Vieux Moulin la jara komuna tagmanĝo de la grupo, kiu estis anoncita per afiŝoj kaj gazetartikoloj al la ne-esperantista publiko. Dancposttagmezo sekvis la manĝon, al kiu partoprenis trideko da personoj, esperantistaj aŭ ne, inter kiuj troviĝis S-ino Jacqueline Lefebvre, vic-urbestrino de Yvetot.

PETRO POTTIER

#####

RENCONTRE YOGA-ESPERANTO

- * Relier le corps, le mental et la conscience
- * S'initier à la langue universelle, par la RIKA METODO
- * Découvrir en promenade l'un des plus beaux sites de Normandie

DU VENDREDI 8 NOVEMBRE 1991 - 17H30 - AU LUNDI 11 NOVEMBRE - 17H30

Vous serez accueilli au centre "La Fresnaye Saint Hellier", dans une petit village normand, entre le pays de Caux et le pays de Bray, et serez hébergés en chambre à 2. 195 frs par jour et par personne, soit pour 3 jours:585 F.

----- Fiche d'inscription -----

Rencontre yoga - esperanto

NOMO

PRENOMO

TEL.

ADRESSE

DEMANDE l'inscription de personnes. Pour jours du Novembre au Novembre
VERSE au titre d'arrhes : par personne 195 Frs.

Règlement par chèque bancaire ou postal, établi à l'ordre :

"Groupe Yoga du C. O. C" C. C. P. n° 2495-45 Y

date

signature

à retourner à : Annette BATAILLE 6, rue Louis Danger 76 530 GRAND COURONNE

Ne nur policistoj kaj ŝtelistoj, aŭ murdistoj, ŝatas la policromanojn, ankoraŭ ĉe plej pacamaj, burĝaj, rondventraj legantoj furiozas tiaj legaĵoj. Same por la esperantistoj kiuj, inter du internaciaj kongresoj dum kiuj oni laŭdas fratecon kaj solidarecon, volonte vivas je la ritmo de krimoj kaj nigraj enigmoj. Sur la bretoj de la samideanoj Jean Forge "Mr Tote aĉetas mil okulojn" najbaras kun la "Ĉu..." serio de Valano (Piron), aŭ Lorĵak "Regulus". Je la distanco de du-tri sangogutoj vi trovos la verkojn de Tavanti "Varmas en Romo" aŭ de Deck Dorval "Jaŭto veturas for kaj veturigas la morton"...

Tamen, mirinda afero estas ke la plej famaj poliverkistoj kiel Patricia Highsmith, Agatha Christie, Gaston Leroux, Maurice Leblanc...ne, aŭ preskaŭ ne estis tradukitaj esperanten. Tre certe ili plezurigus nin.

Pro tio, ni salutu la tradukon kiun faris Dominique CORNICE, loĝanto en Carrouges (61). Li tradukis verkon de sendube la plej fama inter la verkistoj de krimromanoj, nome Conan Doyle. Espereble, D. CORNICE trovos eldonejon por tiu leginda traduko de "LA MARARMEA TRAKTATA - 10A AVENTURO EL LA MEMORAĴOJ DE SHERLOCK HOLMES."

Anoj de U. N. E. havas la favoron la unuaj legi eltiraĵon de tiu enketo.



sherlock HOLMES

Holmes sidis ĉe sia flanktablo, vestita per negliĝa surtuto kaj pene laboranta sur ĉia analizo. Granda kurba retorto furioze bolis en la blua flamo de Bunsen-brulilo, kaj la distilitaj gutoj kondensiĝis en du-litran mezurilon. Mia amiko apenaŭ eklevis la okulojn, kiam ni eniris, kaj vidante, ke lia analizo devas esti grava, mi sidigis en fotelo kaj atendis. Li ĉerpis en tiun kaj alian botelon, elprenante po kelkaj gutoj per sia vitra pipeto, kaj finfine alportis provtubon entenantan solvaĵon al la tablo. Li en sia dekstra mano tenis strion da lakmusa papero.


"Vi alvenas al kriza momento, Watson", li diris, "Se tiu-ĉi papero restos blua, ĉio bone. Se ĝi fariĝos ruĝa, tio signifas homan morton." Li trempis ĝin en la provtubon kaj tuj ruĝigis al malhela, intensa karmezino. "Hm! Mi tion ja supozis!", li ekriis. "Mi estos ĉi tie via dispono post momento, Watson. Vi trovos tabakon en la Persa pantoflo." Li turnigis al sia skribotablo kaj haste elskribaĉis telegramojn, kiujn li transdonis al la servoknabo. Poste li sidjetis sin sur la kontraŭan seĝon, kaj suprentiris siajn genuojn ĝis li per siaj fingroj ĉirkaŭprenis siajn longajn mincajn kruojn.

"Tute ordinara murdeto", li diris. "Vi havas ion pli bonan, mi supozas. Vi estas la sturma kuriero de l'krimo, Watson. Kio ĝi estas?"

Mi transdonis al li la leteron, kiun li legis kun plej koncentrita atento.

el "La MararMEA traktato - 10-A Aventuro el la Memoraĵoj de Sherlock Holmes"
de Sir Arthur Conan Doyle, tradukis Dominique CORNICE

Le Boulay, Rouperroux
61 320 Carrouges



NIA ĜENERALA ASEMBLEO 1991

en la 12.13^a ESTU BONVENAJ EN OCEANA PORDO : HAVRO de Oktobro

Havro estas hodiaŭ la ĉefa landa haveno por trafiko de konteneroj kaj la dua plej grava de la lando kun 200 000 loĝantoj. Sed kiel ĉio komenciĝis, kaj kiam ?

Havro estis fondita en 1517 pro enŝlimiĝo de tiamaĵaj havenoj Harfleur kaj Honfleur. Havro akiris famon dank'al siaj filoj : esploristoj aŭ maraj teknikistoj kaj la haveno prosperiĝis pro sia lokiĝo (proksimeco al Parizo, atlantika fasado). Pasintan jarcenton, negoco estis bazita sur importado de kotono, kafo kaj eksotikaj lignoj. Antaŭ la dua mondmilito, Havro estis elŝipejo de transatlantikaj ŝipegoj. Havranoj ĉiam konservas melankolion de tiu epoko. Nun regulaj linioj de pramŝipoj ligas irlandan kaj britan havenojn. Sur la kampo de turismo, Havro dediĉis intereson al velŝipado, sed ankoraŭ balbutas pri libertempa someruma aktiveco.

Ni invitas vin malkovri atestaĵojn de Havra pasinteco : vidindaĵoj en la centro de la urbo. Estu scivolemaj pri nunaj konstruaĵoj kaj estu niaj gastoj por tiu oktobra semajnfino !

Kelkaj notindaj promenadceloj :

- * La strando cirkaŭ 2km etendiĝas
- * La malnova Havro : katedralo Nia Dama, malnovaj domoj, preĝejo Sankta Francois Basenoj, fiŝkaptista kvartalo.
- * La moderna Havro : urbodomo kaj centro : rekonstruita kvartalo laŭ Perret, preĝejo Sankta Josefo, kaj ties sonorilturo 107 m alta, forumo Niemeyer kaj teatro.
- * For de la betono : arbaro Montgeon, parko de Rouelles

BONVOLU ATENTI : kiel konate, niaj Ĝeneralaj Asembleoj estas la pinta momento en la vivo de nia regiona asocio. Dum ĉi, ni povas amike babiladi pri esperanto kaj io ajn, ĝui agrablan distran vesperon kaj viziti parton de Normandio. Sed plej grave estas ke la Ĝ. A. de UNE estas okazo retrorigardi al la pasinta jaro, kaj antaŭvidi la venontan. Pro tio, ju pli multaj ni estos des pli bone fartos nia asocio. Nepre sendu rapide vian aliĝilon, multe dankon.

~~~~~

### LA KASISTO RICEVIS

Jen la listo de kotizoj ricevitaj de Aprilo ĝis Junio 91, al ĉiuj multe dankon:  
 HIS LEHEUP DUHAMEL POTTIER CHEVALLIER SAUNIER VIVIER COUTURE GUERRE  
 MICHAUD FERET. Ĉu vi mem pagis vian kotizon ?

Barbara Cvetkova kiu vizitis Francion dum Junio kaj Julio 1990 skribas al ni:

Leningrad, 7an de Junio 1991

Karaj geamikoj,

La 31an de Majo 1991, jam pasis unu jaro post tiu feliĉa tago, kiam frumatene, mi staris sur stacikajo de Parizo.

Post longaj jaroj, plenumiĝis revo de mia infaneco!

Kaj jen 80jaraĝa Barbara Cvetkova spiras francan aeron, ŝajne saman aeron kiu ekzistas en ĉiuj stacidomoj de tuta mondo!

Kiel kutime, aŭdiĝis alvokoj, kisoj, ĝojaj ĉirkaŭbrakumoj. Rapide ĉio finiĝis; alvenintoj malaperis kun siaj amikoj kaj plenaj ĉaretoj. Sur la kajo, restis solaj mi kaj tri sovetaĵ sportistoj. Sed mi estis trankvila, ĉar kredis ke nepre iu venos ĉar mi estis telegraminta.

Subite, mi ekvidis konatan malaltan figuron kun pakajĉareto: tiu estis Andrée Massard. "Helo ! Andrée", ekkriis mi. Varma kiso kaj ni marŝis al nekonata Parizo.

"Sidu ĉi tie kaj atendu Pierre; bedaŭrinde mi devas kuri hejmen" diris Andrée, "estu trankvila, al Pierre mi telefonos." Si foriris kaj mi kometis rigardi preterirantojn. Ili marŝis tien kaj reen, gajaj kaj malgajaj, junaj kaj maljunaj, diversvestitaj; eĉ la haŭto estis diverskolora. Grupoj da infanoj veturantaj verŝajne por ekskursi: infanoj gajaj kaj krientaj! Finfine venis Pierre Quillaud kaj ni iris al aŭtobuso. Elirante de stacidomo, mi ekvidis longan vicon da homoj. "Ĉu vi same havas longajn vicojn? Tiuj homoj atendas taksion ĉar strikas laboristoj de la metroo."

43 tagojn neforgeseblajn mi travivis en Francio. Multe da novaj amikoj kaj belaj urboj mi vidis dank'al tre bona organizanto, -Pierre Quillaud.

Li planis bonege mian restadon en Francio; ĉio detale estis skribite, kiam kien mi devas veturi. Normandio ege ekmemorigis al mi malproksiman Leningradon: ĉiutage pluvigis; estis 8°. Nur kiam mi veturis suden en Sanary/mer estis suna varma vetero. Tie mi renkontis miajn amikinojn de malproksima infaneco (1918-1919)

Bela blua maro, krioj de mevoj, belaj floroj estis antaŭ miaj okuloj. Tion forgesi ne eblas! Dankas mi ĉiujn geamikojn kiuj gastis min el tuta koro kaj mi esperas ke mi ne tro tedi ilin.

Mia fidela korespondanto Pierre donis al mi tian feliĉan vojaĝon.

Barbara CVETKOVA

Le Havre

# ALIĜILO

12.13 Octobre

(à renvoyer pour le 15 Septembre, s. v. p.)

NOMO (Nom) :

PERSONA NOMO (Prénom) :

ADRESO (Adresse) :

TELEFONNUMPERO (Téléphone) :

SUBSKRIBO :

Signature

AKOMPANOS MIN : Indiku kiom da personoj (indiquez le nbre de personnes vous accompagnant)

Mi deziras partopreni la Ĝeneralan Asembleon de U. N. E., laŭ la subaj kondiĉoj. Je partecipe à l'A. G. de U. N. E. selon les conditions suivantes :

| <u>MI TRANOKTOS</u> (nuit) *                | <u>PREZO</u> (prix) | <u>KIOM</u><br><u>DA PERSONOJ</u> | <u>SUMO</u> |
|---------------------------------------------|---------------------|-----------------------------------|-------------|
| <u>SABATON</u> (le samedi)                  | 55,00               | X                                 | =           |
| *Nokto + matenmanĝo (nuit + petit déjeuner) |                     |                                   | <u>SUMO</u> |

+

| <u>MI MANGÔS</u> (je mangerai)     | <u>PREZO</u> (prix) | <u>KIOM</u><br><u>DA PERSONOJ</u> | <u>SUMO</u> |
|------------------------------------|---------------------|-----------------------------------|-------------|
| <u>SABATON VESPERE</u> Samedi soir | 65,00               | X                                 | =           |
| <u>DIMANĈON TAGMEZE</u> Dim. midi  | 75,00               | X                                 | =           |
|                                    |                     |                                   | <u>SUMO</u> |

+

| <u>ALIĜKOTIZO</u> (cotisation) | 55,00 | X | =           |
|--------------------------------|-------|---|-------------|
|                                |       |   | <u>SUMO</u> |

+

Mi pagas la tutan sumon al (je verse la somme totale à)

" GROUPE ESPERANTISTE DU HAVRE "

La ĉekon mi sendas al (je retourne ce chèque et ce bulletin à) : SYLVIE CARON

44, rue Gustave Lennier  
76 600 LE HAVRE

ENTUTE